

SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Federacio Langvedoko-Rusiljono
N° 142 - 3a kvaronjaro 1997 - Jarabono 35 F al

Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon CCP 956-28P Montpellier



Le 82° Congrès Universel d'Espéranto qui s'est déroulé à Adélaïde (Australie) du 19 au 26 Juillet 1997 sur le thème "Tolérance et justice dans une société multiculturelle" a réuni 1241 délégués de 57 pays. L'Unesco, qui a décidé d'établir des "relations opérationnelles" avec l'Association Universelle d'Espéranto (UEA), avait envoyé un représentant et les congressistes ont reçu un message de M. Koffi Annan, secrétaire général des Nations-Unies.

☆☆☆

Pour mieux faire connaître l'espéranto, UEA a décidé de lancer la "campagne 2000" avec le concours de ses associations nationales et des milliers de groupes locaux, actifs dans plus de cent pays. Face aux risques d'une situation de quasi-monopole d'une langue dominante, les promoteurs de la campagne soulignent les avantages d'une langue planifiée du type de l'espéranto : sa neutralité pour tous les peuples, gage d'une protection efficace des langues nationales et régionales, sa bien plus grande facilité d'étude pour un coût considérablement réduit, sa valeur propédeutique pour l'apprentissage ultérieur des autres langues.

☆☆☆

Les Jeunes Espérantistes se sont aussi rencontrés cet été. D'après Sylvie Roques, jeune Toulousaine présente à ces rencontres, ils étaient plus de 600 d'une quarantaine de nationalités à Assise (Italie) - soit 5 fois plus qu'il y a 5 ans - où ils ont d'ailleurs établi un nouveau record de "bamba" : 1h36 mn et une centaine à la semaine riche et variée qui a suivi à St Raphaël (France).

☆☆☆

En 98, alors que se déroulera le Congrès Universel d'Espéranto à Montpellier, les "très jeunes" - de 6 à 12 ans environ - passeront une semaine ensemble à Sommières à 30 km de là. Le bulletin d'inscription avec informations générales est disponible à SFS.

☆☆☆

Les "moins jeunes" trouveront dans ce numéro un bulletin d'adhésion pour le 83° Congrès Universel d'Espéranto (p. 3), les tarifs d'adhésion et différentes informations (p.2 et 3.) ainsi que le premier bulletin en couleurs réalisé grâce au concours du Comité régional de tourisme.

☆☆☆

En raison de l'ajout du "premier bulletin du congrès", nous avons dû réduire le nombre de pages de SFS. Il en sera de même pour le prochain numéro où une autre surprise vous attendra. Merci d'en tenir compte et de nous envoyer des articles concis. Anticipan dankon ! Bonan legadon de SFS 142 !

31a Internacia Infana Kongreseto
SOMMIERES - Francio
1 - 8 aŭgusto 1998



UK 98 (Universala Kongreso de Montpellier) **Demandoj kaj respondoj / Questions et réponses:**

Comment peut-on s'inscrire au congrès ?

Il suffit de remplir la page suivante puis de la détacher, la plier et l'envoyer à UFE (Union française pour l'Espéranto) 4bis, Rue de la Cerisaie 75004 Paris Tél: 01 42 78 68 86 en joignant un chèque du montant déterminé par la date (de réception à UFE), la catégorie, etc.

Comment profiter du meilleur tarif ?

En s'inscrivant au plus tôt (1^o période); la dernière fois nous vous avons donné le tarif en guldens, cette fois vous avez le tarif en FF. Si l'on prend la cotisation de membre de UEA catégorie MJ, on profite même d'un tarif réduit (770 F).

Pourquoi y-a-t-il une catégorie A et une catégorie B ?

Parce que les niveaux de vie sont différents suivant les pays; La France est dans la catégorie A.

Mon conjoint doit-il payer le même tarif ?

Toute personne accompagnant une personne déjà inscrite et ayant la même adresse bénéficie du tarif "kunulo".

Qui est considéré comme jeune (junulo) ?

Quelqu'un de moins de 30 ans au 1^o Janvier 98. Un(e) jeune né(e) après le 31-12-77 ne paie pas.

Est-on tenu de payer cette adhésion ?

Le congrès ne pourrait avoir lieu si chacun se dispensait de participer aux frais ! C'est une question de solidarité ! Un badge personnalisé sera exigé à l'entrée des salles.

A quoi sert cette adhésion ?

A couvrir les frais de "logistique". Pensez au coût de location des salles du lieu de congrès en pleine saison touristique ! Il faut aussi prendre en charge les frais de fonctionnement de l'équipe d'UEA. Précisons que de nombreux bénévoles français sont ou seront actifs au sein d'un comité de congrès. Et puis les inscrits pourront profiter de tous les services du congrès, participer aux conférences, réunions, projections, spectacles, soirées culturelles et artistiques, animations, aux excursions, au bal, au banquet, etc, et surtout constamment rencontrer des espérantistes du monde entier.

Y a-t-il d'autres frais à prévoir ?

Cette cotisation ne concerne pas le logement, les repas, les excursions...

Comment aurai-je connaissance du programme, des possibilités de logement, etc ?

Après votre adhésion, vous recevrez le "deuxième bulletin" qui vous donnera tous ces renseignements. Il n'est pas interdit de régler la question logement par vous-même. Pour les repas, il y aura différentes possibilités, soit dans le congrès, soit à proximité dans le centre ville...

Pourra-t-on se garer à proximité du congrès ?

Certainement. Le comité négocie actuellement des conditions particulières pour les congressistes.

Arriverai-je à me faire comprendre ?

La motivation pour parler est certainement le meilleur remède pour progresser. Un congrès se déroule dans un climat d'amitié qui permet des miracles à ceux qui veulent communiquer... en espéranto.

Et si j'ai d'autres questions à poser avant de m'inscrire ?

Envoyez vos questions à SFS qui fera suivre au LKK (comité du congrès) et la personne concernée vous répondra. Pendant le congrès l'équipe du comité sera là pour vous aider si vous avez un problème.

A bientôt! Ĝis !

Ĝis !

*Aliĝu ĉe la sidejo de UFE kaj samtempe sendu ankaŭ vian aliĝilon.
Bonvolu atente legi vian kongresaliĝilon: Francio estas en la kategorio A*

Kongreskotizoj	1a periodo	2a periodo	3a periodo
validaj ĉiuj en francaj frankoj	ĝis 97.12.31	ĝis 98.03.31	ekde 98.04.01
1- ne individua membro de UEA	957	1197	1436
2- individua membro de UEA ne inkluzivas MG (M.Gvidlibro)	770	958	1162
3- kunulo/junulo/handikapulo ne individua membro de UEA	581	725	872
4- kunulo/junulo/handikapulo mem individua membro UEA	383	479	575

*Rimarko: ĝis nun aliĝo al UEA (MJ kun nur jarlibro en 1997 = 120F)
plus aliĝo al UK en kategorio 2 (por 83-a UK = 770F) malpli kostas ol
aliĝo en kategorio 1 (ne individua membro de UEA). Por 1998, eĉ se UEA
pli-altigos la kotizojn, la afero probable restos valida.*

MEDITERANEE


REGIONO LANGUEDOC ROUSSILLON

83-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Unua Bulteno



Montpellier
1 - 8 aŭgusto 1998



Bonvenon en Francio !

Por taŭge festi sian centjariĝon, Unuiĝo Franca por Esperanto invitas la Universalan Kongreson al Francio. La kongreso okazos sudfrancie, en regiono Langvedoko-Rusiljono, en la agrabla urbo Montpellier, kiu kunigas riĉan pasintecon kaj viglan estantecon.

Francio estas internacie famkonata pro siaj variaj pejzaĝoj, sia longa historio, sia kulturo kaj sia kuirarto. Dum viaj ekskursoj antaŭ, dum aŭ post la kongreso vi povos iom sperti la diversecon kaj kulturan riĉecon de la lando, sed unu vizito certe ne sufiĉas por malkovri ĉiujn aspektojn de tuta Francio, eĉ ne de tuta Langvedoko-Rusiljono.


Montoj kaj maro, dezertecaj altaĵoj kaj fekundaj ebenaĵoj, sablaj strandoj kaj densaj arbaroj, Langvedoko-Rusiljono prezentas kompletan paletton, kun Montpellier en la centro.

Vi ŝatos kongresi en la koro de histoririĉa urbo, kies moderna kongresejo situas apud agrabla ombra promenejo, tuj ĉe la rando de la malnovaj kvartaloj kun ties mallarĝaj stratoj kaj imponaj domegoj, ankaŭ tuj ĉe vigla komerca centro kun multnombraj butikoj vendantaj plej diversajn varojn. Plaĉos al vi sidi ĉe la apudaj terasoj kaj promeni en la friskaj stratetoj. Je kelkaj kilometroj vi estos ĉe la Mediteranea maro, kie vi trovos larĝajn sablajn strandojn, pitoreskajn havenetojn, ostrobredejojn, aŭ ĉe la montoj, kie ramos vin ŝtonaj vilaĝoj, misteroplenaj kavernoj, kolorplenaj pejzaĝoj. Romiaj restaĵoj, mezepokaj kirkoj, modernaj feriejoj, vastaj vitkampoj, ĉiu trovos turisman celon je sia gusto. Ĉie bonvenigos vin la varma mediteranea suno, kaj la bunta kulturo.

*Venu gustumi la regionon !
Montpellier estas urbo, kie vi ĝuos kongresi.*



Universala Esperanto-Asocio



REGION

LANGUEDOC
ROUSSILLON

COMITE REGIONAL DU TOURISME


Grandioza regiono, grandiozaj momentoj

LOZÈRE

Margeride, Aubrac, Vallée du Lot

Inter la herbaj altebenaĵoj de Aubrac kaj la arbaroj kaj riveroj de Margeride, la pejzaĝon de tiu gastama regiono formis la tradicia migrado de la ŝafaroj, kiujn la ŝafistoj ĉiujare gvidis al someraj paŝtejoj.

Meze de tiuj netuŝitaj teritorioj ekologio havas plenan signifon. Tie troviĝas minacataj bestaj specioj, kiujn oni nun reenkondukis en la naturan medion. Lupoj kaj bizonoj, zorge kontrolataj, havas siajn proprajn ejojn, kie oni povas sendanĝere observi ilin.



LOZÈRE - GARD Gorges du Tarn, Cévennes

La montaro Cevenoj estis ĝis antaŭnelonge apenaŭ enirebla kaj konservis sian aŭtentecon, tiel perme-sante al vizitantoj purajn malkovrojn : bredado de silkraŭpoj, ŝtontegmentaj vilaĝetoj kie gastamo


ankoraŭ estas tradicio, kaŝtandarbaroj, kaj eĉ bambuejo, kreita pro ies freneza revo. En la gorĝoj de rivero Tarn, kie eblas traflosi en barko aŭ padeli kanuon, surprizas la vertiĝdonaj kanjonaĵoj kaj imponaj krutaĵoj kaj kornicoj.

GARD - HÉRAULT

Nîmes, Pays Romain, Camargue

En tiu multfaceta regiono, kunfluejo inter Cevena montaro, Garrigues kaj Provenco, miksiĝas la riĉo de potenca romia heredaĵo kaj la moviĝantaj vastejoj de Kamargo, duone akvaj

kaj duone teraj, kiuj estas sala kaj sabla rifuĝejo por unika kaj protektata faŭno. Tie harmonie miksiĝas la koloroj de la naturo : rozkoloro de fenikopteroj, nigro de virbovoj, blanko de ĉevaloj, kiuj ĉi tie galopas tute libere laŭlonge de senmakulaj strandoj.



HÉRAULT - AUDE Montpellier et la Côte du Languedoc


Sur tiu ĉi marbordo ankoraŭ grandparte netuŝita vi trovos ne nur sinsekvon da banlokoj kaj vastegaj sablostrandoj sed ankaŭ prestiĝajn kulturajn heredaĵojn : romanikaj kaj gotikaj kirkoj laŭlonge de

via feria vojo, antikvaj restaĵoj en plej panoramaj lokoj, renesancaj domegoj en kies kaŝitaj malvarmetaj kortoj ankoraŭ resonas la paŝoj de Molière aŭ Rabelais.

HÉRAULT - AUDE Haut-Languedoc, Montagne Noire

Inter la ŝtonaj altebenaĵoj Causses kaj la veprejoj Garrigues aperas unu post la alia diversaj mirigaj pejzaĝoj : vertiĝdonaj kanjonoj, lagoj kun okre ruĝaj bordoj, juvelecaj verdejoj de la naturparko

de Alta Languedoko. Pro sia diverseco tiuj naturaj trezorejoj favoris eke pratempoj la plej altajn homajn realigojn. Tie vitofarejoj kaj aliaj fabrikoj atestas pri riĉa kaj eventoplana historio, kaj en "librovilaĝo" brokantistoj ofertas alispecajn malnovaĵojn.



AUDE - HÉRAULT Carcassonne, Pays Cathare, Minervois, Corbières

En tiuj vastaj virgaj spacoj ekaperas jen kaj jen, sur montokresto aŭ niĉe inter deklivoj ĉe turniĝo de l' vojo, vertiĝaj citadeloj, monaĥejoj kaj kirkoj.


Carcassonne, la plej granda plene konservita mezepoka urbo en Eŭropo, kun siaj krenelaĵoj meze de famaj vitejoj, aperas kvazaŭ bildo el aventurfilmo. De vit' al glas', nur unu paŝ' : la vino, ĉu Minervois ĉu Corbières, kiun ameme enboteligas la vitkultivistoj, redonos al vinŝatantoj ĉiujn odorojn kaj brilojn de ĉi tiuj grandaj lumozaj terenoj.

PYRÉNÉES ROUSSILLON

Perpignan, Côte Catalane et Roussillon

Perpignan, ĉefurbo de Rusiljono, sukcesis konservi originalajn kulturajn riĉaĵojn, de la heredaĵo de la reĝoj de Majorko ĝis la inaj bronzaĵoj de la skulptisto Maillol. Sed Rusiljono havas ankaŭ aliajn gravaĵojn – en Tautavel oni

malkovris la kranion de la plej praa eŭropano (450 000-jara), kaj en Céret ekspoziciĝas verkoj de la grandaj prafiguroj de la nuntempa arto, Picasso, Matisse kaj Chagall, kiujn sorĉis la nedifinebla lumo de la kataluna marbordo. Tie, en Collioure, St Cyprien, Port-Verdres kaj aliaj lokoj, alternas strandoj kaj allogaj rokaj golfetoj.



PYRÉNÉES ROUSSILLON Pyrénées Catalanes

Vaste malfermaj al Mediteraneo, la Katalunaj Pireneoj proponas ĉiajn montarajn plezurojn. Tie staras ankoraŭ la krenelaj turoj kaj

trankvilaj klostroj de romanikaj abatejoj, jen agloneste sur altaĵo jen kaŝite en valetoj sube ĉe monto Canigou. Por plej plezurigi muzikemulojn, en tiuj sanktejoj ĉiusomere okazas muzikfestivaloj.

TURISMA MAPO



RESPONDO

Prospektoj senpage riceveblaj je simpla peto al :
 Comité Régional du Tourisme Languedoc-Roussillon – 20, rue de la République – 34000 Montpellier – Francio
 Telephone : +33 467 22 81 00 – Fakske : +33 467 58 06 10
 Retadreso: contact.crtlr@cnuse.fr – <http://www.cr-languedocroussillon.fr/tourisme/>

<input type="checkbox"/> Turisma mapo	Nomo :
<input type="checkbox"/> Malkovraĵoj	Adreso :
<input type="checkbox"/> Tendumejoj	Poŝtkodo : Urbo :
<input type="checkbox"/> Familiaj restadejoj kaj luaĵoj	Lando :

Kongresaj perantoj

Se estas en via lando, prefere sendu viajn aliĝilon kaj pagon al la peranto. Se ne, sendu la aliĝilon kaj pagon al Roterdamo. Aliĝilojn sen pago oni ne traktos.

Argentino: s-ro Roberto Sartor, Casilla de Correo 344, 5000 Córdoba

Aŭstralio: Libroservo de Aŭstralio E-Asocio, p/a s-ro T. Elliott, P.O. Box 230, 2036 Matraville, N.S.W.

Aŭstrio: s-ro Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg

Belgio: Belga Esperanto-Federacio (BEF), p/a Marcel Delforge, Rue des Glacières 16, 6001 Charleroi-Marcinelle *aŭ* Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasília – DF

Britio: Esperanto-Asocio de Britio (EAB), 140 Holland Park Avenue, W11 4UF London

Ĉeĥio: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, p.k. 1069, 111 21 Praha 1

Danio: s-ro Kaj Røssum, Brunevang 30, 2700 Brønshøj

Finnlando: s-ino Heta Kesälä, Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula

Francio: Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE), 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris

Germanio: s-ro Richard Hirsch, Lambertstr. 12, 36251 Bad Hersfeld

Hispanio: Hispana Esperanto-Federacio, Rodríguez San Pedro 13-3º-7, 28015 Madrid *aŭ* Associació Catalana d'Esperanto, Apartat 290, 08280 Sabadell

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, Pf.193, 1368 Budapest

Islando: Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, 101 Reykjavík

Israelo: s-ro Jehoŝua Tilleman, 97-A Dereĥ-Akko, 26373 Kirjat-Mockin

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, 20143 Milano

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinyuku-ku, 162 Tôkyô

Jugoslavio: s-ino Milica Ristić-Dokmanović, Bulevar JNA 29/II, 11000 Beograd

Kanado: s-ino Olga Du Temple, 765 Braemar Avenue, R.R.No. 2, North Saanich BC, V8L 3S1

Koreio: Korea Esperanto-Asocio, KangByeonHanShinCore B/D No.1601 Mapo-Dong 350, Mapo-ku, Seoul

Kroatio: s-ro Ivica Špoljarec, Voćarska 28, 10000 Zagreb

Latvio: s-ro Māris Jākobsons, Brīvības iela 84-5, 1001 Rīga

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, ab.k. 167, 3000 Kaunas C

Nederlando: s-ro Joaquim Calado, Citroenkruid 7, 3068 DR Rotterdam

Norvegio: Norsk Esperantoforbund, Turisma Servo, v/ Agnar Fitjar, 5240 Valestrandsfossen

Nov-Zelando: s-ro David Ryan, P.O. Box 3867, Wellington 6015

Portugalio: s-ro António da Silva Almeida, Rua Macau, 3, 2º esq., 2700 Amadora

Rusio: Halina Gorecka, ab. ja. 67, 620077 Jekaterinburg 77 *aŭ* s-ro Miĥail Ĉertilov, P.f. 21, 143000 Moskva-Odincovo-6


Slovakio: s-ro Milan Neubeler, Popradskej brigády 14, blok Slničnica B, 058 01 Poprad

Slovenio: s-ino Anka Dvoršak, Maroltova ulica 8, 61113 Ljubljana

Svedio: s-ino Lisbet Andréasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby

Svislando: s-ino Sonja Brun, Waldeggstrasse 28, 6343 Rotkreuz

Usono: Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530



REGION

LANGUEDOC
ROUSSILLON

SUD RESA VACANCES

La regiona rezervo-centro de Langvedoko-Rusiljono estas je via dispono por helpi vin trankvile elekti la idealan

lokon por viaj ferioj en la departementoj de la regiono :

Aude (10), Gard (30), Hérault (34), Lozère (48), Pyrénées Roussillon (66).

La luaĵoj kiujn selektas Resa Sud Vacances estas

garantiataj per kvalitinsigno : “Gîtes de France”


por la kamparaj kaj vilaĝaj loĝejoj, “Clévacances”

por la meblitaj apartamentoj ; la hoteloj, ferivilaĝoj

kaj tendumejoj estas elektitaj en la kategorioj 2-, 3-

kaj 4-stelaj laŭ la nacia klasifiko.

Rezervu por ĝui grandiozan restadon



C. Bertrand Meubléis OPT L.R.

Kiel rezervi ?

SUD RESA VACANCES - Centrale de réservation languedoc Roussillon – 20, rue de la République, 34000 Montpellier – FRANCIO

Telephone : +33 467 92 78 08 – Fakse : +33 467 92 84 06

Retpoŝte : contact.crtltr@cnusc.fr – <http://www.cr-languedocroussillon.fr/tourisme/>

ALIGILO

MONTPELIERO

Konstanta adreso: 83-a UK de Esperanto

Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Aliĝadreso por francoj: Unuiĝo Franca por Esperanto
4bis, rue de la Cerisaie
75004 Paris, Francio



Kongresa numero:

ĈIU ALIĜANTO UZU APARTAN ALIĜILON, FOTOKOPION AŬ SAMFORMATAN PAPERON – BONVOLU
TAJPI AŬ SKRIBI PRESLITERE. LAŬBEZONE METU KRUCON EN LA KONCERNAJN KVADRATETOJN.

FAMILIA NOMO VIRO/VIRINO
(por alfabeto ordigo) (forstreku unu)

PERSONA(J) NOMO(J) UEA-KODO -

ADRESO (nacilingve en latinaj literoj kun poŝtkodo)

LANDO TEL. N-RO (kun prefikso)

PROFESIO / FAKO

ŜATOKUPO NASKIĜDATO

Mi aliĝas al la Kongreso laŭ la kondiĉoj presitaj sur la dorsa flanko;

- mi sendas ĉi tiun aliĝilon al mia landa peranto kaj samtempe pagas al tiu.
- mi sendas ĉi tiun aliĝilon al la CO en Roterdamo kaj pagas laŭ suba specifo:
 - al ABN-Amro-konto n-ro 42.69.01.444 en la nomo de la UK (aldonante 15 gld.).
 - al ĝiro-konto n-ro 627337 Den Haag (aldonante 15 gld.; por nederlandanoj sen kostoj).
 - per eŭroĉeko/poŝtmandato al la adreso de la UK en Roterdamo.
 - per ĉeko favore al UK de Esperanto (aldonante 21 gld.).
 - per Visa/Amex/Mastercard n-ro valida ĝis
 - al la poŝtĉekkonto de UEA en (Belgio 000-1631831-97;
Germanio 3182 91 509 BLZ 370 100 50 Köln; Svedio 74374-0; Svislando 12-2310-0 Genève).
 - el mia UEA-konto, kie estas sufiĉa kredito (bonvolu debeti tie).
- mi ne volas ke mia adreso aperu en la Kongresa Libro.

Mi legis, komprenas kaj akceptas la kondiĉojn presitajn dorsflanke sur ĉi tiu aliĝilo.

DATO SUBSKRIBO

Por uzo de la administracio / peranto:		KOTIZO (vidu dorse)
uea-membro en kategorio/jaro		BLINDULA KASO
spezfolio n-ro:		DONACO AL KONGRESO
konfirmo de peranto:		FONDAĴO CANUTO
PAGO EN CO	KONFIRMO	INFANA KONGRESETO
		TRIAMONDA FONDAĴO
		VOLONTULA FONDAĴO
notoj		KOSTOJ (15/21 gld.)
		ENTUTE (en guldenoj)

Se vi aliĝas kiel kunulo, bv. ĉi tie indiki la nomon/kodon de la ĉefaliĝinto:

Se vi aliĝas kiel handikapulo, ĉu UEA jam havas atestilon? jes / mi kunsendas (forstreku unu)

Se vi aliĝas senpage, bv. skribi ĉi tie la kialon (vidu dorse):

La kotizoj varias depende de la loĝlando de la aliĝanto, laŭ la jena grupigo:

A: Ĉiuj landoj escepte de tiuj menciitaj ĉi-sekve sub B;

B: Jamaj socialismaj landoj de orienta Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.), Afriko kaj Latina Ameriko.

La kotizoj estas pagendaj al la konstanta adreso aŭ al landa peranto (vidu liston en la Unua Bulteno).

La CO en Roterdamo akceptas aliĝilojn ĝis la 15-a de junio 1998.

POR ELEKTI LA ĜUSTAN KOTIZON BV. ATENTE LEGI LA ĈI-PAĜAJN KLARIGOJN.

KONGRESKOTIZOJ VALIDAJ: (ĉiuj en nederlandaj guldenoj)	ĝis 97 12 31 1-a periodo		ĝis 98 03 31 2-a periodo		ekde 98 04 01 3-a periodo	
	A	B	A	B	A	B
Aliĝkategorio						
1. ne individua membro de UEA	280	212	350	265	420	318
2. individua membro de UEA (ne inkluzivas MG):	225	170	280	212	340	255
3. kunulo / junulo / handikapulo, ne individua membro de UEA:	170	128	212	160	255	192
4. komitatano/kunulo/junulo/handikapulo, mem individua membro de UEA	112	85	140	106	168	128

DIFINOJ

Individua membro de UEA: Dumviva Membro (DM), Membro kun Jarlibro (MJ aŭ MJ-T), Membro-Abonanto (MA aŭ MA-T). *Ne temas pri Aligitaj Membroj kaj ne inkluzivas Membrojn kun Gvidlibro (MG).*

Komitatano: Tiu, kiu estas membro aŭ observanto en la Komitato de UEA en la momento de aliĝo.
Kunulo: Tiu, kiu loĝas samadrese kun la ĉefaliĝinto. Ĉefaliĝinto oni konsideras personon kiu pagas kotizon en kategorio 1 aŭ 2.

Junulo: Tiu, kiu naskiĝis inter 68 01 01 kaj 77 12 31 (inkluzive). Oni nepre notu la naskiĝdaton sur la aliĝilo.

Handikapulo: Tiu, kies handikapo postulas akompananton, kaj kiu pruvis tion per kuracista aŭ simila atestilo.

Senpage aliĝas:

- infanoj kaj gejunuloj naskiĝintaj post 77 12 31;

- nemalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj.

La kotizo ne estas repagebla, senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo, eĉ se la Kongreso ne okazas, aŭ okazas en alia urbo.

La kotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn, bankedon kaj eventuale aliajn aparte pagendajn aferojn pri kiuj informoj kaj mendiloj aperas en la Dua Bulteno. La kotizo inkluzivas nenian asekuron.

Kongresaneco ne estas transdonebla al alia persono.

Por la limdatoj kaj aliaj kondiĉoj validas la dato de ricevo de la pago en la CO aŭ ĉe peranto. Aliĝilon sen kompleta pago oni ne traktos.

Kongresa Regularo (ekstrakto): "8. Kongresanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Kongresan Regularon, aŭ malutilas al la UK, kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas la UK." Kiu subskribas ĉi tiun aliĝilon, konfirmas sian respekton por la Kongresa Regularo kaj la laŭstatuta neŭtraleco de UEA, kiu organizas kaj aŭspicias la Universalajn Kongresojn.

Se vi pagas al peranto, bonvolu sendi ankaŭ la aliĝilon al tiu.
Se vi pagas rekte al konto de UEA, sendu la aliĝilon al Roterdamo.

FEDERACIA KUNVENO en Béziers (27 IX 97) :

Partoprenis inter 15 kaj 20 homoj laŭ la horo. Mankis pluraj homoj pro ferioj kaj la bedaŭrinda okazigo samtage de kunveno en Montpellier por la UK. Se sukcesos la refondo de federacio en Sud-Pireneoj, la esperantistoj de Aveyron kompreneble apartenos al tiu federacio. Estis reprezentataj la grupoj de Béziers, Montpellier, Nîmes, Perpignan, venis unuopuloj el Lunel, La Canourgue, Olargues, ktp. La ĉeestantoj bone partoprenis kaj sin esprimis. Krom duhora paŭzo por la tagmanĝo, la kunveno daŭris de la 10a horo ĝis la 18a.

La diversaj grupoj raportis pri la lastaj aranĝoj kaj la projektoj por la venonta jaro. Gratulinda estas la aktiva grupo de Béziers. G. Paing raportis pri la kampanjo "IOO novaj esperantistoj". Oni daŭre sendu adresojn al li de interesiĝantoj pri E°. La prezidanto J. Hénin insistis pri partopreno en la forumoj de asocioj kaj prezentis la du novajn banderolojn pretigitajn de nia samideano R. Figueira. Multajn dankojn al li pro la bonega laboro farita.

Tiuj banderoloj estas kompreneble je la dispono de ĉiu por kunvenoj, prelegoj, ekspozicioj pri E°.

Estus bone, se ni povus ankaŭ realigi panelon kiel tiu de S-ro Bouman, ĉar ĝi vere allogas.

Pri la projekto Centassi, mankas tro da precizigoj, speciale koncerne kostojn. La filmo "la dikta-toro" ne estas la plej taŭga por enkonduki debaton pri esperanto. Pri la datoj oni devas ankaŭ atenti, plej bone estus ekzemple en aprilo por studenta publiko kun filmo de Nandir aŭ Dobrinsky.

JH bedaŭras, ke tro multaj grupoj kaj unuopuloj agas en sia angulo kaj li donas ekzemplojn, kie ni malsukcesis pro tio. Ne estas sufiĉa kunlaborado por komuna agado kaj por dispartigo de la taskoj.

Li mencias aldonajn problemojn pro la UK. La ĉeestantoj opinias, ke ne devus esti problemoj, se ĉiu okupiĝus pri sia parto : ekzemple la federacio pri informado kaj instruado en la regiono, la kongres-komitato pri la preparado de la UK, UFE pri nacia informado kaj formado por la UK, ktp.

La iamaj mallertaĵoj estas forgesitaj sed oni ne plu apliku la samajn metodojn sed male apliku reci-prokan konsultadon. Nur kun koncernataj homoj oni povas sukcesi.

Pri la federacia komitato estas evidente, ke iuj komitatanoj neniam aperas. La sistemo de povodonoj kiel menciite en la statutoj ne vere instigas al partopreno. Komitatanoj estas nepraj kaj nemalhave-blaj por fari sugestojn kaj alporti novajn ideojn. Ni revizios la statutojn en septembro 98 kaj ĝis tiam la federacio funkcios provizore kun la nuna estraro; en septembro 98 ni espereble elektos novajn komitaton kaj estraron. En 98 ni ĉiuj strebos por la sukcesigo de la UK, do ne okazos federacia kongreso en Majo.

Multaj pretas helpi (Annick Tora jam ricevis centon da proponoj de helpontoj el tuta Francio) sed ili deziras scii precize, kion oni atendas de ili. La ĉeestantaj LKK-anoj provis respondi tiun demandon.

JH parolis pri la kongresaj ekskursoj. Ĉu Langvedokanoj ne fieras montri sian regionon? Ĉu oni devas esti spertulo por prepari duontagan viziton al iu loko, pristudi eventuale dokumentojn kaj esperantigi ilin, anticipe viziti la ekskurscelon? Plej bone estus, se al la gvidanto (ĉiĉerono) aldoniĝus por grupo de pli ol 30 personoj lokulo-helpanto. El la cititaj ekskursceloj estas forstre-kendaj kelkaj. Estas rekomendinde aliĝi frue al la UK (detaloj aperos en la bulteno). Al la venonta SFS estos aldonata la belaspekta "unua bulteno" de la UK (ĝin doni al amiko, se oni jam ricevis ĝin).

Kun la decembra numero de SFS estos alia surprizo. La abontarifo restas tamen la sama : 35 F.

Ĉiujare ni devas sendi realvokojn al neglektitaj legantoj ! Grupoj kolektu la abonojn kaj sendu unufoje ! Anticipan dankon !

Estas proponataj la numeroj 5 kaj 7 de "la iĝanta mondo / le monde en devenir" kun multaj argumentoj pri esperanto. Ĉiu grupo disponu pri ekzemplero de tiu franclingva revuo.

Ni adiaŭis ĝis la revido okaze de la venontaj E°-eventoj en nia regiono.

P.S. en français : il reste quelques exemplaires de la revue "le monde en devenir". Les n° 5 et 7 traitent en détail le sujet de l'espéranto. Dans le n° 7 : article de "Maître Capelo" sur l'E° et réponses de Claude Piron, Yvonne Lassagne-Sicard, Henri Masson... Un n°: 18 F, deux n°: 30 F. Paiement à la réception (frais d'envoi en plus). S'adresser à SFS (voir adresse sur la dernière page de ce bulletin).

Même adresse pour proposer vos services pour le congrès universel de Montpellier ou voir numéro précédent. Concernant votre réabonnement à SFS, voir également détails sur la dernière page. Merci de votre attention ! On recherche bricoleurs pour préparer un panneau interactif de présentation de l'espéranto (connaissances en menuiserie ou électricité bienvenues). M. Bouman, auteur de ce système et qui séjourne régulièrement dans la région, serait prêt à donner ses conseils.



VIVO DE LA GRUPOJ :

BEZIERS

Malgraŭ la somera varmo kaj la jara disiĝo de la grupanoj, la esperanta vivo ne haltis. Adelajdo akceptis unu grupaninon, kaj Valencia kvar el niaj anoj. Kvankam malpli ampleksa ol la UK, la hispana kongreso estis vigla kun pli ol 300 homoj, el kiuj multaj venis de malproksime : Kubo, Brazilo, Slovakio, Polio...Tiu lasta sendis 150 partoprenantojn. Ili prezentis belan artan vesperon (kantoj, dancoj...). La respondeculino de Radio Pollando prelegis pri la problemoj al kiuj ŝi alfrontas.

La vera vivo de la grupo rekomenciĝis la 13an de Septembro okaze de Aleoj de Asocioj. Pli ol 200 asocioj ĉeestis tiutage kaj nia budo altiris sufiĉe da vizitantoj (300 dokumentoj disdonitaj). Ĉu ili kuraĝos lerni ? Tio estas alia afero.

La 20an de septembro, ni kunvenis kiel kutime en la Domo de Asocioj. Pluraj kursoj funkcios: en Béziers : en Domo de Asocioj, 2agrada, vendrede je 14h30 en la asocia sidejo, komencantoj: merkrede je 14h30 " " progresantoj, vendrede je 14h30.

Plie alia kurso por komencantoj estas starigita en St Chinian ekde la 30a de Septembro en Mezlernejo

Jean Jaurès, ĝi aparte celas prepari helpantojn por la UK de Montpellier.

Fine de Oktobro estas antaŭvidita "Inicado al Esperanto" en Pézenas.

Notu bone la datojn de la venontaj kunvenoj : 11an de oktobro, 8an de novembro (je 14h30).

Zamenhofa tago: 13an de decembro de la 11a ĝis la 17a. Ĉiuj estas kore invitataj.

Petu aliajn informojn fine de novembro.

En 98, nia unua kunveno okazos la 8an de januaro. La staĝo en Batipaume disvolviĝos komence de Junio. Kaj nun : bonan laboron al ĉiuj!

Gratulojn al la aktiva grupo de Béziers, kiu ekŝemas en apudaj urboj. Imitinda ekzemplo.

MONTPELLIER

Informado :

-Dank'al letero de la Klubo de Béziers al "Midi Libre" (dankon, Béziers!) ĵurnalistino telefonis al mi kaj petis intervjuon pri la kultura centro de esperanto de Montpellier. Mi telefonis al la aliaj montpelieranoj, nur LE respondis (vivu ferioj!). Rezultis artikolo, kiun vi povas legi apude (kiel kutime aperis malĝustaĵoj) sed sekvis 4 petoj de kursoj. Atendante la publikajn kursojn, mi komencis kaj sendis la unuan "rendez-vous".

-Privata televida societo telefonis por peti prezenton de la kultura centro. Tiu elekto estas kaj hazarda kaj pro la fakto, ke multaj asocioj ne respondis. Kiu rezulto ? Ĝis nun 2 plenaj matenoj da laboro, 5 leteroj senditaj, telefon-alvokoj...Neniu reago.

-Pro apero de anonco de Louis Ensuque pri la Internacia Semajno en Sète, ĵurnalisto petis intervjuon ĉe Radio France Hérault pri la 23a Internacia Esperanto-semajno de Sète. Ekster mikrofono Jeannine Bony kaj Yvette Vierne babilis...kaj ni informis pri la UK. Pro la anonco de la Internacia Semajno kaj la foiro de asocioj alvenis 7 petoj por kursoj.

Kunvenoj :

-la 1an de oktobro je 18h30 ĉe MPT L'Escoutaire : jara kunveno, kie ni starigos la jaran programon
-de la 13a ĝis la 17a de oktobro en MPT Marcel Pagnol, Route de Lavérune, ekspozicio pri Esperanto
-17an de oktobro je 20h30 samloke : prelego de André Cherpillod : "L'Europe, mais avec quelle langue ?"
-18an de oktobro : "Festo de esperanto kaj ĝiaj geamikoj" en kastelo kaj parko de Grammont (route de Mauguio) de la 15a ĝis la 21a horo.

Béziers



Les Espérantistes. leur langue est internationale et évolutive.

(artikolo aperinta en gazeto kun foto pri la E^o-budo dum la forumo de asocioj. Maldekstre la prezidantino de la loka grupo S. Authier, dekstre Sro Bouman el Belgio, kiu prezentis sian allogan interaktivan elektronikan panelon).

Y.V.

Do, multaj rendezuoj en Oktobro en Montpellier. Partoprenu !

INVITOJ al Montpellier la 17an+18an de Oktobro

Centre Culturel Esperanto de Montpellier
5, rue du Docteur Roux
34 090 M O N T P E L L I E R
Tel : 04 67 54 15 43

Septembre 1997

Mme, M., Estimata,

1998 est une année exceptionnelle pour Montpellier et l'esperanto.

Un évènement important se déroulera du 1-er au 8 août : Le 83-e Congrès Mondial d'Esperanto au Corum de Montpellier.

Le dernier Congrès Mondial en France eut lieu en 1957 à Marseille avec 1468 participants. Celui de Montpellier en rassemblera près de 4 000 et sera l'occasion de célébrer les 100 ans du mouvement espérantiste français - 1-e organisation nationale constituée !

Pour cela, un comité d'organisation s'active depuis deux ans et ses travaux progressent comme prévu.

A vous, qui vous êtes déjà intéressé(e) à l'esperanto de près ou de loin, nous proposons aujourd'hui une première "Fête de l'Esperanto et ses amis" à Grammont (voir plan) le samedi 18 octobre 97.

Que chacun vienne avec ses idées, ses propositions, ses besoins, et nous organiserons tous ensemble pour l'année qui vient un programme de cours, d'ateliers (traduction, jeux, chanson, etc...) qui redonnera un coup de fouet à l'activité espérantiste locale et permettra à chacun de se (re-)mettre à l'étude de l'esperanto afin de profiter au mieux de la venue de tant de personnes nous arrivant de 70 pays pour le Congrès Mondial de Montpellier '98.

Cette fête commencera à 15 heures et finira à 21 heures, mais vous n'êtes pas obligé(e) de rester tout le temps; vous arrivez et vous partez quand vous voulez, seul, en famille ou avec des amis; vous pouvez apporter votre pique-nique pour manger le soir. Durant l'après-midi, une présentation du congrès mondial sera assurée par plusieurs membres du comité d'organisation, et il y aura aussi un service librairie à votre disposition.

Vous souhaitant en bonne santé et plein(e) d'espoir, nous vous attendons nombreux à Grammont le 18 octobre.

Pour le C.C.E., la Présidente :

Y. Viéme

N.B. : Chacun est également invité à assister à la conférence de M. André CHERPILLOD (membre de l'Académie d'Esperanto) sur le thème : "L'EUROPE, mais avec QUELLE LANGUE ?"

Cette conférence aura lieu le 17 octobre 97 à 20 heures 30 à la Maison Pour Tous Marcel PAGNOL - Route de Lavérune.

Cette conférence clôturera une exposition sur l'esperanto présentée en ce même lieu du lundi 13 au vendredi 17 octobre.

23a INTERNACIA SEMAJNO de Esperanto en Sète (8-15 IX 97)

Jes, jam la 23a !

Reokazis kursoj, banadoj, ekzamenoj, internacia kaj agrabla etoso, kompetentaj instruistoj, bela vetero, ekskursoj...

Kelkaj nekutimaĵoj : inter la 56 aliĝintoj, dum la 2 antaŭtagoj alvenis 12 malaliĝoj pro seriozaj sanproblemoj. Tiel 44 personoj partoprenis la semajnon (kurioze la sama nombro kiel la pasintan jaron !). Tiun-ĉi jaron multaj novuloj, pli ol la duono.

Kiel kutime, ni prezentis E-on al la aliaj ĉeestantoj de Lazaret. Tion verve faris nia nova "propagandisto" Thierry Saladin. Ĉe la fino de la prelego sinjoro rakontis : "mi lernis E-on en 1934 en liceo de Besançon. Dum la milito en 1939 mi fuĝis al Montpellier, kie mi vane serĉis Esperantistojn, poste mi iris al Perpignan, same mi vane serĉis Esperantistojn. Post la milito mi ne aŭdis pri E-o. Hodiaŭ mi vidas, ke Esperanto ne mortis. Ĉiuj miris. Kiel dum tiu longa tempo eblas ne aŭdi, legi pri E° ? Partoprenantino de la E°-semajno diris : "Mia patro lernis E-on dum la hispana milito kaj poste diris al siaj infanoj : "kiam vi aŭdos pri kurso de E°, iru kaj lernu ĝin !" Tion ŝi faris... sed nur en 1990 !

Du pensigaj faktoj. Kiel fartas nia informado ? Certe ne tro efika ! Konklude la staĝo en Liono estas nepre utila ! Partoprenu !

Y.V.

NDLR : Restas nur du jaroj ĝis tre speciala Jubileo en Sète. Espereble tiam ne venos malaliĝoj kaj estos rekorda nombro da partoprenantoj dank'al la novuloj de ĉijare kaj aliaj novuloj post la UK.

Certe la informado pri E° ne estas troa kaj iom lamas. Sed se oni ne legas gazetojn, ne aŭskultas radion, ne vizitas forumojn de asocioj, konsultas nek minitelon (3615 esperanto) nek interreton, oni neniam aŭdos pri ĝi. Due, la informado en gazetoj ekzemple ne dependas nur de esperantistoj, sed de la bonvolo de la gazetestroj kaj ĵurnalistoj. Trie estas bone ĉiam provizi plurajn adresojn de asocioj, referencojn de libroj (Que sais-je?, Assimil) kaj fine... mankas informoj koncerne la unuan staĝon pri informado en Liono en Novembro (nenio pri ĝi en la Septembra numero de "Franca Esperantisto"). La dua staĝo disvolviĝos en Parizo aŭ Montpellier. Pri tiu staĝo respondecas Pascal Lecaille Tel: 04 72 36 07 14.

Aldona rimarko pri la septembra numero de FE : sur p.123 staĝoj por 97-98: estas anoncata nur tiu de Agde. Sur p.124 kaj sekvantaj : kurslistoj por 1997 anoncataj en Béziers kaj Perpignan. Sur p.126 kaj sekvantaj : "lokaj grupoj raportas". Raportis Béziers, Perpignan... kaj Narbono pri "prelegoj pri 4 tipaj kubaj grupoj". Certe la repondeculo en Narbono bonvolos nin informi pri tiuj okazintaĵoj. Ni ne forgesu la internan informadon !

PERPIGNAN

Dum la pasinta jaro ni komencis traduki "Historio de la urbo Perpignan", el la teksto de la paneloj situantaj tra la urbo, laŭ la loka historio. La traduko entenas dekkvin paĝojn, estos preta por la fino de la jaro kaj certe por la U.K. de Montpellier en 1998.

La tradukado okupis la ĉefan parton de la meza kurso dum la jaro (kurso de S-ro Benazet).

Ankaŭ okazis en pasinta jaro la unuagrada kurso, gvidita de S-roj Joly kaj Gérard-Voinçon.

Kvar lernantoj sukcesis en "Atesto pri lernado": Ghelfi Solange (Perpignan), Vaydin Christiane kaj Gilbert (Villemongue de la Salanque) kaj Boix Philippe (Millas). Gratulojn al ĉiuj !

La ĝenerala kunveno okazos la 8an de oktobro 1997 ĉe la sidejo.

L'Espéranto défie Babel

En août 98, Montpellier recevra plusieurs milliers d'Espérantistes

■ « L'Espéranto m'a offert le monde. Tous les jours j'ai le bonheur de recevoir des lettres de mes amis habitant aux quatre coins de la planète. »

En 1956, Yvette Vierne, étudiante à la faculté de Médecine, rencontre une jeune journaliste japonaise parcourant le monde grâce à l'hospitalité d'Espérantistes. « Ce fut comme un déclic. Je pratiquais déjà l'Espéranto, mais c'était extraordinaire de parler avec quelqu'un venu de si loin » Entourée d'amis, elle fonde en 1957 un groupe espérantiste montpellierain.

Aujourd'hui, le Centre Culturel Espéranto de Montpellier réunit cinquante membres, et vingt élèves, propose des réunions, des conférences, des cours et des stages. Louis Ensuque, membre actif, est formel : « L'Espéranto est la langue la plus facile à apprendre. À l'inverse, l'enseignement des langues vivantes demande

beaucoup d'énergie pour de faibles résultats. »

Les Espérantistes ont une foi déconcertante dans cette langue initiée en 1887 par le docteur polonais Louis Lazare Zamenhof. Yvette Vierne, née dans les Cévennes, ne renue en rien ses origines occitanes. « Il existe une association internationale espérantiste qui lutte pour la protection des langues minoritaires », précise-t-elle.

Le bonheur de ces gens se lit facilement dans leurs propos. « J'ai rencontré des Finlandais, des Coréens, des Japonais, des Polonais... lors de congrès. J'ai lu de nombreux ouvrages de cultures différentes traduits en Espéranto... C'est très vivant et, en fin de compte, on s'aperçoit qu'au-delà des différences, l'âme humaine est faite des mêmes éléments. » Il est très difficile d'estimer le nombre d'Espérantistes. Cependant, chaque année un Congrès mondial reunit de 2 000 à 5 000 personnes. En août 1998, c'est Montpellier qui recevra ces amoureux de l'idéal. •

B.S.

FOIRO de ASOCIOJ en Montpellier la 14an de septembro 1997

Zorgis dum 10 horoj seso da esperantistoj inter kiuj Frédéric Durand, novbakita kaj juna. Lia ĉeesto multe helpis kaj junigis la budon.

Estis disdonitaj ĉirkaŭ 150 faldfolioj, kiuj konsistas el 2 prezentoj de la movado, 1 de la lingvo kaj unu de la loka vivo : aktivaj membroj, sidejadreso kaj telefonnumero, datoj kaj lokoj de kunvenoj, staĝoj, kursoj kaj kompreneble anonco pri venontjara universala kongreso en Montpellier.

Notindas, ke

1)ni disponis pri duobla spaco kompare kun lastaj jaroj; ni rezervis unu budon pro loka E°-klubo kaj alian budon, tuj apudan, pro loka kongreskomitato de la 83a UK.

2)ni uzis 3 malsimilajn banderolojn : "Esperanto", "la langue internationale de l'amitié" kaj "Montpellier, ville du 83° congrès mondial d'esperanto".

3)gazetistino de loka radio lasis sian adreson kaj bonvolas anonci niajn renkontojn, staĝojn, kunvenojn, kongresojn, ktp.

4)ni havis multajn kontaktojn kun Bahaanoj. La prezidanto tuj kontaktos Claude Nourmont pri nia UK kaj multaj membroj jam pretas lerni esperanton. Do laciga kaj tamen esperplena tago ! L.E.

(DLR por kompletigi : la teksto de la federacia plurkolora banderolo (vidu la raporton pri Béziers) estas precize : Rendez-vous avec le monde / à Montpellier en Août 98 / pour le congrès universel d'espéranto.

En apuda budo deĵoris la Naturamikoj kun dokumentoj pri E° de Sat-Amikaro. En alia apuda budo (Franc-Usona amikeco) gejunuloj francaj...vestitaj laŭ la usona maniero ; admiro ne havas limojn !

Fine en la vidalvida budo de "Europe-étudiants" oni disdonis broŝuron de la Ministrejo pri Eùropaj aferoj, kie oni tiel prezentis la lingvan diversecon....Vidu ĉi-poste, kiel oni prezentis la lingvan diversecon sur la budo de la E°-grupo en Béziers la saman semajnfino.



d comme... **diversité**

L'Union européenne n'a pas vocation à devenir un seul pays, ni même un ensemble trop homogène où régnerait l'uniformité. Tout au contraire, elle protège la diversité et la spécificité de la culture européenne.

Tous les textes communautaires sont élaborés et traduits dans les onze langues officielles des quinze pays de l'Union. Pour le plus grand bonheur des traducteurs, nombreux dans les institutions communautaires !

NE PERDONNS PAS...



...La TÊTE

L'Europe utilise 11 langues différentes ce qui représente 110 traductions. Avec une langue de transition, tel que l'espéranto, cela demanderait seulement 24 traductions : dans les deux cas, au frais des contribuables !

Faites votre choix ...

Actuellement cela coûte 500 000 000 000 de Francs !!!

On attend plus de 3000 participants au CONGRES MONDIAL d'ESPERANTO

à Montpellier en 1998 du 1er au 8 août. C'est un événement de grande importance pour la Région Languedoc-Roussillon tant sur le plan culturel que sur le plan touristique. Ces personnes de langues différentes utiliseront uniquement l'Espéranto pour se parler et se comprendre.

La solution ?

Il y a plus de 4000 langues dans le monde sans compter les langues dialectales qui représentent une richesse, une culture propre à chacune. Il ne faut pas les détruire. Il y a près de 80 langues en Europe.

L'espéranto est une langue planifiée, créée en 1887 par le Dr Zamenhof, polonais. C'est une langue neutre, elle n'est la propriété de personne et reste au service de tous.

Facile à apprendre : 200 heures suffisent à la connaître de façon différente pour une conversation courante.

LANGUES :

Cet été, "Midi Libre" a eu la bonne idée de vérifier au téléphone le niveau de compréhension de l'anglais dans les lieux d'accueil comme hôtels, campings, S.I...

REPERES

1/8/97

SONDAGE

Le test du téléphone

... Les questions étaient pourtant des plus simples...

Les questions de notre enquête téléphonique étaient « avez-vous encore des places disponibles » et « que puis-je visiter dans votre ville », le tout en anglais, évidemment.

...le journaliste reste bien sûr convaincu que l'anglais est parlé par presque tous les touristes (à vérifier !) mais découvre que les O.T. ne sont pas au niveau...

Pour les offices de tourisme, c'est une autre histoire. Le propre d'un organisme d'accueil est bien d'accueillir, et tout le monde, spécialement les touristes, qui, de quelque nationalité qu'ils soient, parlent presque tous anglais !

Sur dix offices appelés en Aveyron et en Lozère, deux seulement furent à même de comprendre et de renseigner en anglais, même approximatif. Dans les autres, c'est uniquement en français, et parfois avec beaucoup de mauvaise volonté.

...Même résultat dans les hôtels; guère mieux dans les campings. La conclusion semble surprendre l'enquêteur. Peut-être qu'à force de répéter que tout le monde parle anglais avait-il fini par le croire...

Le sentiment, au terme de dizaines d'appels, c'est que beaucoup de gens font des efforts pour comprendre et répondre, même s'ils commencent par « Aie aie aie, plus doucement », mais qu'ils sont vraiment encore très nombreux à ignorer l'anglais

...Un lecteur, lui, s'offusque de cette conception du tout anglais...

14/8

En effet, que penser de ce journaliste qui trouve curieux que l'on ne parle pas anglais partout pour accueillir les touristes. A se demander s'il ne croit pas que notre pays est sous protectorat anglo-saxon, que l'anglais y est obligatoire pour vivre?

Faut-il rappeler que le français est une langue internationale, au même titre que l'anglais et que, si nous faisons l'effort de parler la langue de Shakespeare, les autres peuvent faire l'effort également de parler la nôtre ?

Sait-on aussi, que les directives gouvernementales poussent à une politique linguistique tendant vers le plurilinguisme et non vers le bilinguisme français/anglais ?

Enfin, je me demande s'il ne serait pas judicieux, après tout, avant de critiquer l'accueil réservé aux touristes en France, de faire la même enquête en Angleterre ou aux Etats-Unis, question de savoir si, là-bas dans les points touristiques, on parle français !

Régis RAVAT (Manduel)

...enfin, un vice-président d'OT trouve indispensable que ses collaborateurs se mettent d'urgence à l'étude des langues. Il serait intéressant de savoir comment lui-même maîtrise les langues

26/8

étrangères... Et puis, il n'a jamais été question d'utiliser l'anglais au détriment du français et si l'anglais est aujourd'hui la langue véhiculaire par excellence, je soutiens, au risque de réveiller la colère de votre lecteur, que nos services d'accueil devraient rapidement apprendre l'allemand, l'espagnol et l'italien avant de commencer l'étude du russe et du chinois. D'ailleurs, des études concernant l'accueil linguistique dans les pays concurrents ont démontré que nous avons encore beaucoup de retard sur ce plan.

Jean-Claude GHENO
vice-président de l'Office du tourisme (Saint-Ambroix)

... "Midi Libre" s'est aussi intéressé aux congrès de langues (sauf à celui d'Espéranto !), même quand ils n'ont regroupé que 200 participants et quand il a fallu ajouter (pour le congrès de latin) la traduction en anglais !...

Près de 200 congressistes berbères ont entamé hier à Tafira, dans les îles Canaries, leur premier congrès destiné à internationaliser leur lutte en faveur de la reconnaissance de l'identité amazighe (berbère) en Afrique du Nord et au Sahel. Les Canaries ont été choisies pour rappeler l'appartenance de cette terre à «Tamazgha». Cette appellation désigne le territoire des Berbères, qui allait de cet archipel de l'Atlantique à la légendaire oasis égyptienne de Siwa et des côtes méditerranéennes à l'Afrique subsaharienne.

12/8

200 congressistes d'une vingtaine d'Etat, dont le Vatican, confrontent depuis jeudi dernier leurs expériences de l'enseignement du latin et ont l'occasion d'écouter des conférences sur les liens entre la civilisation romaine et les pays d'Europe du nord dans l'Antiquité et au Moyen-Age. La documentation fournie par les organisateurs du congrès, en latin, finnois et anglais, précise que le choix de la Finlande, en compétition avec Rome et Budapest, était une façon de rendre hommage au travail de pionnier de ce pays pour le renouveau de la langue latine.


...enfin le "Journal de Montpellier" s'inquiète du polyglottisme réduit des candidats bénévoles qui vont accompagner les joueurs de 32 nations en Juin 98. Et dire que le congrès d'E° regroupera le double de nations et n'aura pas besoin d'interprètes !

Des candidats polyglottes



79 % des candidats ont des notions d'Anglais.
60 % possèdent des notions d'Espagnol, un candidat sur cinq possède des notions d'Allemand.

Mais la Coupe du Monde, ce sont 32 nations, issues des épreuves qualificatives disputées sur tous les continents. C'est dire que toutes les compétences linguistiques sont les bienvenues. La pratique de l'Arabe, du Bulgare, du Danois, du Grec, du Norvégien, ou encore du Portugais pour certains candidats sera peut-être mise à contribution en juin 98. Réponse après le 4 décembre 1997, date du tirage au sort à Marseille qui désignera les équipes qui joueront au Stade de la Mosson.



	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
I	P	A	R	A	N	O	M	A	Z	I
II	A	P	O	L	O	G	E	T	I	K
III	R	A	V	E	■	I	M	A	G	O
IV	T	R	E	■	P	V	■	K	O	N
V	I	T	R	I	O	■	O	S	T	O
VI	K	A	S	■	E	S	T	I	■	G
VII	U	M	■	R	N	T	O	■	I	R
VIII	L	E	G	I	T	I	M	A	D	O
IX	A	N	I	M	A	L	A	■	E	F
X	R	T	R	■	R	E	N	I	T	I

Solvoj de la 141-a

HORIZONTALALE

- I) Misdat(o).
- II) Verna ĉefrolulo / E-a elstarulo.
- III) Leĝe plibonigi / Metal(o).
- IV) Tal(o), ekzemple / Glav(o), ekzemple.
- V) Elstara inflam(o) / Laŭ Sankta Vito !
- VI) Senkompata / Nacia emblem(o).
- VII) Neperfekta ideal(o) / Evitinda kvartalo.
- VIII) Ĉiela punkt(o) / Meze de sofo.
- IX) Ĉiuj(o) / Apartenas al spice odora herbo.
- X) Pordeg(o) de ŝintoa templo / Returnita boato.

VERTIKALE

- 1) Ekster - kaj enist(o).
- 2) Fadenverm(o) / Prepozicio.
- 3) Homarpart(o).
- 4) Ĉielpart(o).
- 5) Prepozicio.
- 6) Restaŭrenda oligarkio.
- 7) s : Patriarko / Minaĵo.
- 8) Kormalsan(o) / Tigofin(o).
- 9) Tajloscienc(o).
- 10) Terur(o) de la formikoj.

s : sone

BOPARO.

Por la venonta numero de "Sudfrancia Stelo", kiu aperos en Januaro 1998, viaj kontribuoj estos bonvenaj ĝis la fino de la Jaro 1997.
 Adreso de la redaktoro : Jean Hénin Beauregard-Route de Montcayroux
 48500 La Canourgue Tel/Fax:04 66 32 86 36.
 Ne forgesu reaboni, la abonkotiĝo restas la sama : 35 FF. Adreso de la kuzistino : Lucette Négron 40, Chemin des Amandiers 34400 Lunel.
 Ĉekoj je la nomo de : Fédération d'espéranto du Languedoc-Roussillon
 pĉk/ccp 956-28 P Montpellier. Anticipan dankon !